



PENSEO

N-ro 274

aŭg. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



mensa ligo

superkresko de sableroj
per vento skeletigis la arbaron.
en la ĉelo miaj ĉeloj sen celo forfluas
restigante ostojn kun horloĝa eĥo.



ankaŭ mi volas flugi

ankaŭ mi volas flugi
sed per fungoforma nuboj tamen el saplikvo.
vidinte ĉielon la superan,
mi falu sur montojn aŭ en lagon.



rendevno

je la difinita horo venis vi
al mia ĝardeno kun maturaj mandarinoj.
anstataŭ suĉi sukono de la fruktoj
ni intermelkis la mielon el la nesto
kvindekjara.

prodaĵo

kunportante la bitmapon,
mi ekveturis al la horizonto.
por mezuri vin ne nur en sonĝoj
mi pentris la ĝemelan rondon kiel la
terglobon.



Nazaré Laroca (Brazilo)



Avataro

Al Rabindranath Tagore



Ho, Poeto,
transcenda voĉo,
kie Vi estas?

Mielo dia,
la melodio
de viaj versoj
amon elverŝas
sur la Teron,

Kaj Poezio
el rava fluto

per lum' plenigas
mian vivon.

Juiz de fora, 04/07/2014.

Minas Gerais

Tagiĝo

Senlime
en la lim'
de l' koro,
mia mem'
Tagor(e)iĝas.

Pro orakolo
venis Amor',
kies glorkrono
tute trembrilas
kiel lunlumo.

Laŭ la spuroj
de l' Poeziprinco
survoje al ĝuo,
min trafas Reĝo.



Juiz de Fora, 08/07/2014.

Mori (Usono)




Vi

Vi forestas
vi neniam estis ĉi tie
ĉe mi
por mi!
Sed ankoraŭ
mi skribas al vi
por vi
pri vi
kaj ankoraŭ

mi verŝas
vinon
por vi kaj mi!

Kiel diferencas
via ĉeesto
aŭ foresto?
Vi ĉiam vivas
kun mi
en mia koro!



Mi volas...

Mi volas kredi je Universo-Dio
sed malhelpas min mia religio

Mi volas esti fidela amiko
sed malhelpas min ondoj de Politiko!

Mi volas esti ja honesta homo
sed malhelpas bestoj kun homa nomo!

Mi volas vivi samkiel kolomboj
sed malhelpas min militoj kaj bomboj!

Mi volas esti pensulo libera
Sed malhelpas min edukado mizera!

Mi volas esti libera persono
sed malhelpas min muroj de prizono!

Mi volas esti saĝa patrioto
Sed malhelpas fanatika idioto!

Mi volas esti bona civitano
sed malhelpas min hundoj de l' Tirano!

Mi volas vivi kiel fiŝo en maro

sed malhelpas min mia registaro!

Mi volas vivi kiel bird' en aero,
sed malhelpas idiotoj sur la tero!

Mi volas vivi laŭ mia naturo
sed malhelpas min la urba kulturo!



Dimitrije Janicic (Serbujo)



LA BELECOJ DE LA MONDO

(El poemo *La avo kaj la nepo*)

...

Kara mia,
vi miru al tago,
tempo por ago,
tago kiu aŭroras,
tagiĝas,
lumon donacas,
kaj nin forlasas,
nokton kreas.
Miru vi al nokto
kiu alportas pacon
forprenas lacon.
Miru vi al ĉielo
al ĝia lazuro
rondon de l' Suno
de roĵo-klareco
de Luno-soleco
al steloj brilaj
al kosma senfino
al patrino
kaj al ino.
Miru vi al tritiko,
abelo kaj formiko,
miru al leono
al tempesto, bela mateno
kaj al lakto de nebulo

al infana rido
flugo de birdoj
al printempa floro
al homa koro
al koloroj de aŭtuno
al ama fajro
al lerteco de kreintoj
al forto de ondoj
al mildeco de patrino,
al beleco de fabelo
al sia lernado,
lahoro kaj tornado,
al mondo mozaika
kaj la vivo unika.

...



Petro Palivoda (Ukrainio)



Libertempo

mi volis skribi
versaĵon
pri libera tempo —
ne havis tempon

Rozo

Ŝi sole staris mirigita,
trista kaj malĝoja,
ĉar opiniis, ke ŝi estis
ununure bela,
sed tamen floroj ĉi belecon
ial ne rimarkis...
Kaj ŝi ne sciis: floroj ĉiuj
estas ja reĝinoj.



Paulo Silas (Brazilo)



Kie estas la optimistoj?

Mi estos optimisma, ĉar facilas...
 Sur sama tem' mi bele plu rondiras.
 Dolĉetajn poemetojn pri revemo
 Mi verkos por elmontri la sintenon
 De bonkondata knab' esperantista.
 Ho, grandan dankon pro l' konsil' decida!
 Sendube pravas vi per vort' admona.
 Mi dankos eĉ per tiu rim' plensona!
 Agnosko plej humila min nun trafis.
 Pardonu se antaŭe mi prifajfis.
 Junul' ekemplodona mi fariĝos.
 Per laŭd' al antaŭuloj ni feliĉos.
 En verda sekt-konkordo mikromonda,
 Ni dancos kaj balaos perkonfrontan
 Klopodon trovi veron sublinian.
 Donacas plensonecon mi alian.
 Ĉu notis vi disigon de l' a-vorto?
 Jes, nune mi deziras nur konkordon!
 Se ĝi la homan tiras familion,
 Min tiras bel' de l' rev' de l' Papili-hom',
 Sur kies ŝultroj batas du flugiloj:
 Persist' kaj senĝeneco de martiroj.
 Ho, poemverkistino famkonata,
 Ne zorgu pri poeta lud' teatra.
 Ho, super-estimataj recenzistoj,
 Eterne dormu vi sur ĝustaj litoj:
 Komfort' florornamita respektplene.
 Sincere mi honoros: rekvieme!
 Sed, jes ja, mi parolas optimisme.
 Neniam ripetiĝos tiu mis', ne!
 Bongustajn perfektaĵojn mi prikantos.
 Ekstazajn versojn lerte mi skandos:
 Malsat' infanojn murdas tra la mondo.
 Brilegas optimism' en horizonto!
 Dum kreskas la financa kataklismo;
 En bal', kokete dancas optimismo.
 [Denove rimo statas pli perfekta
 Ol romantika optimism' koketa.]


Optima optimisto optimismas
 Eĉ se la vortfarad' neologismas.

— Minacas regi min la plensoneco.
 Mi bone lernas l' optimisman decon.
 — Trompulo! N-finaĵon vi enmetis
 En rimon, kiu preskaŭ plenperfektis.
 — Aĥ! Plena splen' plenplenas dum mi penas
 Neŭtrala resti... Ve! Min vi venenas!

— Silentu! Nin la Majstro kaŝaŭskultas.
 “Ĉu daŭre religie vi min kultas?”
 — Hej! Kia mistera senkorpa voĉo!
 “Ankoraŭ mi atendas finan sorĉon...”
 — Ha! Estas li sorĉisto el transvivo.
 — Ne... Nura optimismo kaj naivo.



Leielia (Meksikio)



En la silento

La kareso de iu rigardo,
 la kareso de iu rideto,
 la silento por aŭskulti
 la batadon de la koro,
 estas tre teneraj kialoj,
 varmaj kaj subtilaj por diri:
 Mi amas vin ...
 eĉ netuŝite,
 eĉ sen esti proksimaj ...
 eĉ sen muziko...
 en la silento vi povas aŭskulti
 la kanton de la vivo,
 kaj la kanton de la amo ...
 adorata...

16a de junio 2012.

Tiu ĉi fojo

Subite mi jam ne scias kion fari
 subite mi jam ne scias kiu mi estas
 subite mi rekonas neniam
 pri kio mi iu tago estis
 hodiaŭ mi mem demandas kion ŝanĝis ene de
 mi
 hodiaŭ mi mem demandas kien mi iros
 eble ne ekzistas respondoj
 por kio mi provas solvi

Tiu ĉi fojon mi venas serĉante la koron
 tiu ĉi fojon mi provos denove
 tiu ĉi fojon kaj plu mi provos fari ĝin plibona
 se vivo donas al mi alian ŝancon.

Subite mi jam ne scias kio okazas ene de mi
 subite mi jam ne scias kiu mi estas
 eble ne ekzistas la respondoj
 por kio mi provas solvi

Tiu ĉi fojon mi ne volas alian seniluziigon
 tiu ĉi fojon mi provos denove
 tiu ĉi fojon kaj plu mi provos fari ĝin plibona
 se vivo donas al mi alian ŝancon.



Cezar (Germanujo)



Balkonio

Greg vojaĝos Balkonien.
 Forpermeso do nenien.
 Laŭ konsil' de „Balkonvojo“
 aventuroj lin atendas.
 Tion sperti simple endas,
 vokas tagoj nur kun ĝojo.

Greg ne devos pagi monon,
 aŭ pli bone nuran onon.
 Venos tagoj sen insultoj.
 Greg do foje hejme restu,
 la konsilon ruzan testu
 kaj scivole pri l' rezultoj.

Falis for prepardeprimoj,
 ĉiuj aĉaj flugotimoj,
 ĉia streso, atendado.
 Greg nur sur paper' forestis,
 sed en vero hejme restis,
 venis kapen eĉ balado.

Balkonion li tre gloris.
 Baldaŭ oni lin adoris
 pro l' profundo de l' aŭtoro.
 Balkonvojo nun lin pagas,
 lia famo ĉien vagas:
 „Balkonvojo, mia oro!“

Fine venis eĉ la ŝtato,
 venis ĝi kun granda ŝato!
 Kaj gratulis tre fervore.
 Balkonvojo – jen ekzemplo!
 Nova civitana templo!
 Ni salutu vin elkore!



Dioj bedaŭrinde ebriaj

Vagadis iam Iĥtireks'
 en la areo de kompleks'.
 Rezulte kaptis lin perpleks'
 kaj li kurbiĝis laŭ refleks'.

Sed proksimiĝis eĉ en flug'
 kun fulmrapido Pekinug'.
 L' terenon, lin eĉ sen hezit',
 ĝi voris tuj kun apetit'.

La ĉionpova Superreks'
ekvidis ĉion tra konveks'.
Laŭ spegulbild' de l' lentofagoj
li notis ĉion tuj sub „Plagoj“.

De l' skribskrapista Supra Maks'
eliris urĝa fi-fa-faks':
„Dioj dormas pro ebri' -
sed esperu plu ni.“

Siv Burell (Svedujo)



Arboj

Landoj sen arbar' mi ne volus!
Kiel aspektus naturo,
se verdaj arboj ne rolus
grandan rolon per aera puro?



Venenoj venas pli kaj pli
ankaŭ acidiĝo de la grundo,
sed oksigenon donas al ni
arboj, kun verdaj foli-inundo.

Kie infano grimpus,
se arboj nenie troviĝus
kaj kie la birdoj kovus
la idojn naskitajn ĉi tie?

Jadranka Miric (Serbujo)



Luno

Oriĝas Luno .
Ĉielo stelbrilanta.

Somera nokto.

Saluton al vi!
Jen, lampiro dancanta
salutanta min .

Viaj okuloj
al mi okulsignadis.
Ve, koketulin'!



Consuelo Velázquez

Kisu min multe

(la tre konata bolero *Bésame mucho*)

Kisu min, kisu min multe
kvazaŭ la amo finiĝos
por ni ekde nun.
Kisu min, kisu min multe
ĉar mi ja timas vin perdi,
ne vidi vin plu.
Esti kun vi mi deziras,
dum viaj okuloj
nur spegulas min,
Pensu ke eble jam morgaŭ
mi estos tre fore,
tre fore de vi.

Kisu min, kisu min multe
kvazaŭ la amo finiĝos
por ni ekde nun.
Kisu min, kisu min multe
ĉar mi ja timas vin perdi,
ne vidi vin plu.

Kisu min, kisu min multe
Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)

Ewa Lipska (1945-)



ELPORTI LA NOKTON

Elporti nokton mi ankoraŭ povas

Vi sole fermu ĉiujn pordojn.

Nur la nokto kun mi restu

kaj la stratoj disforkiĝu

ĝis tien, kie ili ekas esti.

La saĝul' eterna de ĉi mondo

fine mortu. La raport' pri liaj agoj

restu en ruloj pergamenaj

al kiuj muŝoj algluiĝos.

Elporti nokton mi ankoraŭ povas

Mi'n tedas iu. Lumo brilas.

El malproksima flank' de l'urbo

ies infanoj promeniras

kun manklako

ĉar en la tomboj tro frostiĝis.

Ankoraŭ la saĝul' multjara

por la infanoj elimagis

riĉan bankedon baltasaran.

Vekiĝis steloj, sur piedfingroj

ĉirkaŭ l'infanoj faris ringon.

Mi lacrigardas en apertan pordon.



Esperantigis



Helena Tylińska (Italujo)

Shefqete GOSALCI

Larmaj kisoj

Ankoraŭ ne koninte jam

Mi deziris vin

Mi amis vin

Mi revis vin kvazaŭ en la fabulo

Mi pentris dum la rosecaj matenoj

Per animaj koloroj

Kaj renkontiĝinte

La larmoj interkisiĝis

NOVEMBROJ KAJ NOVEMBROJ

Jarcenton la ĉielo ploradis

Sub ĝi la tero tondris

Kaj la kronado okazis

Unu Novembro en Vlora

La ĉielo kaj la tero kroniĝis

Per suna ringo

Per pinto de stelo la luno la invitilon-ordonon
alportis

Vi povas kuniĝi

Post kiam vi la vivon fordonu

Kaj la morto vivo okazis

Granda kvazaŭ monto

La stelaro Diinojn elektis

En la trono de la lumigado

La sango la ĉielon enflamigis

La frostiĝintan novembrofinon la suno
varmigis

Ĝi la lulilojn plenigis

La aglon sur la flago ŝirmigis

Por la ceteruloj la tomboj lokon ne plu havis

La vivo en la manoj — kiel donacon restis

Ni kelkfoje dumtage mortiĝis

Nin oni akuzu, insultu, humiligu

Denove en Novembroj

La lulilon ni envane lulu

Per haltigita horo

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Ĉineske

Veĵdo (Ĉinujo)



Revizito al la Feina Monto

—laŭ ĉinesko Pusaman*

Jam en frua somero

la bakanta vetero

per varmega ond'

regas super mond'.

Monto feina

altaĵ-domina

ŝirmas kontraŭ varm'

la homojn en svarm'.

Leviĝas friska vento

blove el oriento

susure sonas

varmeton donas.

La vivo viglas

sed homoj pigras.

kuŝado kun ĝu'

babil' sen enu'.

Nuboj sur la ĉielo

ŝvebas sub venta pelo

jen malrapide

jen tre senbride.

En ombro nuba

pejzaĝo suba

paradas per verd'

kun birda koncert'.

Atakas fresa aer'

naztruojn la homajn per

saniga efik'

al korpa fortik'.

La akvo pura

el font' natura

sanigas korpon

forigas morbon.

Kia bela sukavat'!**

jen kun favora klimat'

sen polva polu'

sen ĥaosa bru'!

Mi per la pilgrim'

kun kora estim'

ja al vi Fein'

kultas kun kapklin'.



23-07-2014

*Pusaman (Budhista dancisto): ĉina fiksforma poemo
el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5
silaboj kun para rimo

**sukavato: Pura Lando laŭ budhismo.

Yanke (Ĉinujo)

Reveno al hejmboko

—laŭ ĉinesko Haoshijin*

1.

Foje en jaro
al hejmloko reven'
pretas bonorde por
Novjara festen'.

Homoj veturas per trajn'
de svarma homplen',
spite kunpuŝiĝon
sen ajna ĉagren'.

2.

Hejma Alvoko
spronas homojn al ir'
por rekuniĝo jen
de homa dezir'

Peniga vojaĝo ja
eble per korŝir'
muelas, sed ili
restas kun aspir'.

**Haoshijin (Proksimiĝas bona afero): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)*

Yanke (Ĉinujo)

Frumatene

—laŭ ĉinesko Dianjiangchun*

Frumatene
revenas klara konsci'
kaj energi'
denove al mi.

Frumatene
jam da forto pli
pretiĝas
por korp-funkci'
kaj mensa raci'.

**Dianjiangchun (Ruĝiĝitaj lipoj): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)*

Lily (Ĉinujo)

Mia amata ĉevaleta

—laŭ ĉinesko Nangezi*

Jame senedza
mi vivas sola
por jaroj malmolkola
sed restas tede senkonsola.

Ofte suspiras
mi pri edzo-perd'.
Li amoradis kun lert'
kaj tre kontentigis min per spert'.

Li montris forton,
kun arda pasi',
per konstanta puŝ-seri'
ĵonglis per voluptema magi'.

Nun anstataŭ li
la kara gadmes'
venas al mia neces'
mi uzas ĝin ofte sen forges'.

Je erotiĝo
mi ekigas ĝin—
vere magia maŝin',
ĝi ŝpinas kaj vibras kun sangvin'.

Eterne dura,
neniam mola,
ĝi laboras firmvola
vera am-ludilo frivola.

Jen ĝi tiklas
min ĉe l' klitorio
ĝis sukiĝas por boro
farota de plasta aktoro.

Mi ĝin enŝovas
vaginon glite,
Mi orgasmas subite

eligas ĝemkriojn ekscite.

Mi vere volas
pli da seksa ĝu',
tri fojojn orgie plu,
ĝis mi kolapsas sen eta bru'.

Ha, kia ludil'!
Sen ajna peto
ĝi atendas kun preto—
mia amata ĉevaleto.

**Nangezi (Suda kanto): ĉina fiksfirma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)*

Octave Mirbeau (1848-1917)



La simplaj animoj

Tuj kiam S-ro parokestro eksciis, ke S-ro Ruvino, nur malsana de antaŭ du tagoj, tre malbone fartis, li alkuris apud la mortiganto. Enkondukita en la dormoĉambron de la maljuna servistino, stultigita pro la doloro, li apenaŭ povis reteni sian emociion, kaj larmoj plenigis liajn okulojn. Li rapide viŝis ilin, kaj batalante kontraŭ si mem, li aspektigis sian emociitegan vizaĝon preskaŭ ridetantan.

S-ro Ruvino, tre pala, tre febla, kun la naztruoj iom kunpremitaj kaj abunda ŝvito inundante lian frunton, ripozis sur sia lito. Liaj manoj gratis la tolon de la littuko sed sen subitaj gestoj de nervŝtreĉiĝoj, el lia gorĝo leĝera siblado eligis sed sen doloraj stertoroj. Li ne ŝajnis suferi. La agonio tordis neniun el liaj muskoloj, konvulsiis neniun el liaj trajtoj, kiuj restis kvietaj. Li mortis kiel oni endormiĝas.

La dormoĉambro estis tute hela kaj radiantanta kun siaj blankaj muroj, siaj kurtenoj kun gajaj floretoj, sia etoso de pureco kaj morala paco. Tra la malfermitaj fenestroj rigardante al la ĝardeno, la vespersuno eniris

en la ĉambron akompanata de la aromoj de la floroj, kaj tie for super la montetoj, kiuj polvadis en la ora brumo, granda kvietigita ĉielo, tre milda granda ĉielo, el perlamota bluo, igis fonon de adorinda lumo al tiu respektinda kaj terura dramo de la morto.

S-ro parokestro alproksimiĝis al la lito, marŝante sur la piedpintoj. Li kredis vidi pasi maltrankvilon en la okuloj de la mortiganto, kiu demande fiksas la eniranton. Tiam la pastro kliniĝis kontraŭ li kaj diris:

– Mi ne venas por tio, kion vi kredas... mi ne venas kiel pastro... Mi ĉiam respektis vian vivon... mi respektos vian morton... Estu trankvila, mia amiko... Endormiĝu ne timante min.

Poste, per iom pli tremanta voĉo, kiun la emocio strangolis:

– Mi venas amike diri al vi lastan adiaŭon, lastan kaj fratan adiaŭon!...

Li tenere ekprenis la manon de la mortiganto, kiu jam malvarmiĝis, premis ĝin per delikata forto, kaj ankoraŭ diris:

– Mi ankaŭ venas por demandi al vi, ĉu vi havas kelkajn apartajn rekomendojn por konfidi al mi. Ĉiuj viaj volo, mia amiko, estos fidele respektitaj, kun pieco, kia ajn ili estas! Tion mi ĵuras al vi!

S-ro Ruvino, per malcerta rigardo, montris letermeblon, lokita kontraŭ la muro inter la du fenestroj... Liaj lipoj moviĝis tiel feble, ke la pastro divenis, pli ol li aŭdis la mallaŭtajn vortojn prononcitajn, kiel malproksima susurado, de la agonianto.

– Morgaŭ!... tie... por vi... letero... dankon!

– Bone, diris grave la parokestro...

Kaj, kiel oni prononcas predikon, li rediris:

– Kia ajn ili estas!...

La parokestro sidiĝis sur brakseĝo, apud la litkapo, kun la malvarmega mano de la agonianto en la sia, kaj li restis tie longtempe, ne dirante unu parolon, senmova kaj afliktita.

Li pensis pri la escepta kaj preskaŭ mirakla beleco, kiu estis la ekzistado de S-ro Ruvino, pri lia inventema bonkoreco, kiu savis de la malsato tiom da mizeruloj, kaj konigis al ili la vivĝojn kaj la mildecon esti bonulo. Li precipe pensis pri tiu fakulto, tiel diri evangelia, kiun li havis por revenigi al la bono la devojigitajn animojn kaj la kompatindajn perversigitajn korojn, neniam parolante al ili pri Dio, al kiu li ne kredis, neniam uzante la religiajn konsolojn, kiujn li taksis kiel danĝeraj, malmoralaj kaj vanaj. Liaj rimedoj por mildigi la malamojn, superforti la krimon, venki la diboĉojn, estis nure homaj. Li nur uzis tiun forton, misteran kaj simplaniman al kiu, kiam ĝi estas bone regita, nenio rezistas: la amo! La brava parokestro komprenis, ke tiu heredaĵo de bonfaroj, S-ro Ruvino estis testamentonta ĝin al li, kaj li sentis tion tro peza por li.

– Jes! Jes! Tio estos tro peza por mi!... Neniam mi sukcesos, li sin repetis interne... Kaj tamen, mi havas la helpon de Dio, kaj la senkondiĉan komplacecon de ĉiuj sanktuloj de la sankta Eklezio!... Ha! Eble Dio ne sufiĉas!... Necesas ankaŭ administrado!...

Kaj jen... Administradon mi ne havas!

Dum li meditis pri tiuj emociaj aferoj, la vespero alvenis kaj baldaŭ noktiĝis. La maljuna servistino ŝaltis noktolumeton, kiu dissendis funebran lumeton en la ĉambron; poste, ŝi alkubutiĝis al la dorsoapogilo de la brakseĝo, kie la pastro meditis, kaj ŝi mordis al si la lipojn por ne ekplori. Nova beleco, blanka kaj luma eterneco ekposedis la vizaĝon de S-ro Ruvino, kiu samtempe, kiam la vivo forlasis lin, simpligis ĝin, ĝis ne plu konservi nenion homan, kaj transfiguriĝis en speco de revo, sub la nevideblaj fingroj de tiu skulptisto, kiu estas la morto.

Ĉar aliaj devoj alvokis la pastron al lia parokestrejo kaj la preĝejo, kiam la horo alvenis, li ekstaris, pie kisis la frunton de la mortiganto, kvieta kaj profunda tiel, kiel ĉielo,

kaj li eliris el la dormoĉambro, kie post kelkaj momentoj, io granda, preskaŭ dia, tuj malaperos. Tiam la maljuna servistino, kiu kondukis lin en la ŝtuparo, eksplodis en larmoj.

– Iu viro kiel li!... Iu viro kiel li!... Morti sen la bona Dio!... Kia malfeliĉo!

– Ne juĝu lin! Diris la pastro kun lia montrofiguro levita al la ĉielo. Ne juĝu lin, ne pli ol mi juĝas lin, ne pli ol Dio, kiu ĉion scias, juĝos lin... Li estas sanktulo!

Revenante al la pastrejo, li pripensis, la spirito invadita de dubaj teruroj:

– Sen Dio, li vivis admirindan vivon... Li mortas, sen Dio, kvieta kaj radianta, kiel sanktulo! Dio mia!... Ĉu do eblas, ke Dio estas senutila al tiuj, kiuj posedas konsciencan?

Matene S-ro Ruvino mortis, samtempe kiam estingiĝas la steloj.

* * *

Jen tio, kion entenis la letero trovita morgaŭe en la letermeblo. Sur la koverto estis simple skribita la nomo de la parokestro.

"Mia kara amiko,

Mi deziras esti enterigita civile kaj sen pompo. Mi vivis for de la bruo, mi volas silente foriri. Mi precipe volas, ke la eklezio ne venos, per la mensogo de siaj preĝoj, rompi la harmonion de tuta vivo pasinta ekstere ĝia kulto kaj ĝiaj kredo.

Vi malavare helpis min por plenumi kelkajn utilajn bonfarojn al homoj, mi lasas al vi la zorgon daŭrigi ilin, laŭ la ideoj skribitaj en mia testamento. Mi do kalkulas je via tolerema amikeco, via bonkoreco por plenumi tiun superegan volon, kiom malfacila ĝi povas esti al via animo de kredanto, kiom kontraŭa ĝi reale estas al via karaktero de katolika pastro. Kaj pri tio mi dankas vin.

Luizo Ruvino."

Kiam la parokestro finis legi tiun leteron, tiel timigan kaj mallongan, li restis neniiginta. Li ne pensis pri tio. Li pripensis ĉion, krome tion. Tio ne estis veninta al lia spirito. Kaj

